# *La heredanta princo de Japanio, Naruhito, akceptis la kuban vicprezidanton.*



Ricardo Cabrisas,  vicprezidanto de la ministra konsilantaro de Kubo, kiu plenumas oficialan viziton en Japanio, estis akceptita de la heredanta princo Naruhito en Tokio.

Cabrisas dialogis kun la princo Naruhito, al kiu transdonis salutmesa?on de la kuba prezidento Raúl Castro kaj komentis pri la nuna stato de la rilatoj inter la du landoj.

Cabrisas renkonti?is kun membroj de la parlamenta ligo de amikeco Japanio-Kubo, kies prezidanto, la deputito Keiji Furuya, ratifis la pretecon de la Ligo por kontribui al ampleksigo kaj profundigo de la reciprokaj rilatoj.

La kuba vicprezidanto estis akceptita en la komerca ?ambro de Japanio, kies prezidanto Toshio Nakamura, esprimis la pretecon de la institucio kontribui al evoluigo de la ekonomiaj kaj komercaj rilatoj inter amba? landoj.

Aldone, la kuba delegitaro, vizitis la centron de ekspozicioj de Panasonic, kie li povis konstati la lastajn teknologiojn de tiu grava korporacio.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/49003-la-heredanta-princo-de-japanio-naruhito-akceptis-la-kuban-vicprezidanton

**Radio Habana Cuba**